

Laste, sed certe ne malplej grave, mi skribas pri mi en la rilato kun nia asocio, ISAE. Mi estas membro ekde antaŭ la mondo-milito, estadis japana delegito en 1966-1982, estis prezidanto en 1978-1980, vicprezidanto en 1981-1985, kaj ankoraŭ estrarano (1986-).

Sin'itirô Kawamura

Noto de la ĉefredaktoro

Mi kaptas ĉi okazon por gratuli kaj varme danki la karan jubileulon pro lia impona scienca verkaro, kiu alten levas ankaŭ la reputacion de ISAE. Same mi dankas pro lia oferemo pri nia asocio. Longe li estu sana kaj feliĉa!

J. Kavka

Oficialaj informoj de AE (Akademio de Esperanto)

*Sendependa lingvo-instituto
fondita de d-ro L.L. Zamenhof en 1905*

Post studo kaj propono de sia Gramatika Sekcio, AE voĉdone akceptis jenan rezolucion:

1. Post ita/ata/ota- vorto, la aganto estas indikita per **de**. Ekz. ŝi estas amata de ĉiuj. (6-a regulo de la fundamenta gramatiko.)

2. Post o-vortoj, **de** povas indiki la aganton, se neniuj aliaj koncernanto estas ebla. Ekz., la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoro, k.s.

3. Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj okazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas **fare de**. Ekz. la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de *Zamenhof*.

La direktoro de la sekcio
pri gramatiko
Michel Duc Goninaz

La presidanto
d-ro *André Albault*
(21, rue de Verfeil,
F-32100 TOULOUSE,
Francio)

Esperantlingva nomenklatur de la fungogeno rusulo

*Josef Kavka (Ĉeĥoslovakio)**

1. Enkonduko

Ekde mia knabaĝo mi estas interesata pri mikologio; fakte ĝi inaŭguris mian tutvivan orientitecon al la naturhistorio. Kvankam tiu ĉi orientiteco iom post iom fariĝis pli geologia ol biologia, tamen eĉ nuntempe mi sentas devon kontribui al esperantlingva literaturo fungosciencia, tiom pli, ĉar ĝi restas ĝis hodiaŭ tre malriĉa.

2. Rusuloj

La genro **rusulo** (*Russula Pers. ex S. F. Gray*), angle *russula*, france *russule*, hispane *rusula*, estas unu el la plej bone esploritaj fungogenoj. Kun la genro **laktario** ĝi apartenas al la familio de la **rusulacoj** (*Russulaceae Roze*), tre homogena grupo, klare distingebla, eĉ konsiderinde izolita disde la ceteraj **agarikaloj** (lamenhavaj bazidiomicetoj). Nuntempe oni konas preskaŭ 300 rusul-speciojn (el tio 200 en Eŭropo), por kies esploro oni dankas al diverslandaj specialistoj (v. la literatur-elekton). El la modernaj verkoj apartan atenton meritas tiu de *Romagnesi* (1967). Laŭ la sistemo de ĉi aŭtoro mi nun pritraktu — el la vidpunkto nomenklatura — la speciojn plej gravajn (81).

La problemecon ligitan kun esperantigo de la botanika nomenklatur mi tuŝis jam antaŭ nelonga tempo (1982). Tiam mi emfazis la principon, ke la esperantlingva nomenklatur laŭeble plej fidele imitu la internacie normigitan kodon de la nomenklatur latinlingva. Tiam mi skribis, ke “la rekonebleco estas ĉi-okaze pli grava ol la vortsignifo” kaj ke “multaj latinaj epitetoj jam perdis sian semantikan elvokivecon”.

* D-ro de natursciencoj, kandidato de teknikaj sciencoj, emerita ĉefo de specialgeologia esplorcetro, *Lužná 7, 160 00 Praha 6 - Vokovice*.

La eksplikita principo memkomprene validu ankaŭ por la fungoj. (Paren-teze, en la nomenklaturaj etnolingvaj, la situacio povas esti tute alia. Ekz. *Velenovský* prave rekomendis, ke la ĉefa mikologia nomenklaturado ne imitu skla-vece la latinan, sed preferu solvojn, per kiuj pli taŭge karakteriziĝos ecoj de l' unuopaj specioj.)

En la sekvantaj paragrafoj, la proponatan esperantlingvan nomenklaturon de la sekcioj, subsekcioj kaj specioj paralele akompanas la originala latina, inkludanta ankaŭ la aŭtornomajn mallongigojn.

Se oni dezirus kompletigi per tiuj ĉi ankaŭ la version esperantlingvan, sufi-ĉus etaj modifoj, ekz. anst. "*Pers. ex Fr.*" oni uzus "*Pers. el Fr.*", anst. "*in*" oni uzus "*en*", anst. "*et*" oni uzus "*k.*" k.t.p. Temas pri jenaj aŭtoroj:

<i>Arn. et Gor.</i>	<i>Arnauld kaj Goris</i>	<i>Melz.</i>	<i>V. Melzer</i>
<i>Batsch</i>	<i>A. G. K. Batsch</i>	<i>Pearson</i>	<i>A. A. Pearson</i>
<i>Bres.</i>	<i>A. J. Bresadola</i>	<i>Peck</i>	<i>C. H. Peck</i>
<i>Bull.</i>	<i>P. Bulliard</i>	<i>Quél.</i>	<i>L. Quélet</i>
<i>Cooke</i>	<i>M. C. Cooke</i>	<i>Romagn.</i>	<i>H. Romagnesi</i>
<i>Ferd. et</i>	<i>Ferdinandsen kaj</i>	<i>Romell</i>	<i>L. Romell</i>
<i>Winge</i>	<i>Winge</i>	<i>Schaeff.</i>	<i>J.C. Schaeffer</i>
<i>Fr.</i>	<i>E. M. Fries</i>	<i>J. Schaeff.</i>	<i>Julius Schaeffer</i>
<i>Gill.</i>	<i>C. C. Gillet</i>	<i>Secr.</i>	<i>L. Secrétan</i>
<i>S. F. Gray</i>	<i>S. F. Gray</i>	<i>Sing.</i>	<i>R. Singer</i>
<i>Krombh.</i>	<i>J. V. Krombholz</i>	<i>Smith</i>	<i>W. G. Smith</i>
<i>Kučera</i>	<i>J. Kučera</i>	<i>St-Amans</i>	<i>St-Amans</i>
<i>Kudrna</i>	<i>K. Kudrna</i>	<i>Velen.</i>	<i>J. Velenovský</i>
<i>J. E. Lange</i>	<i>J. E. Lange</i>	<i>With.</i>	<i>W. Withering</i>
<i>Lindl.</i>	<i>S. Lindblad</i>	<i>Zv.</i>	<i>J. Zvára</i>

3. Sekcioj, subsekcioj kaj specioj laŭ *Romagnesi*

3.1. sekcio: kompaktaj; *Compactae*

3.1.1 subsekcio: plorantaj; *Plorantinae*

Sur freŝa rompsurfaco ili eligas akvecan latekson, do ili "ploras".

specioj: r. ĥloroida; *R. chloroides* (*Krombh.*) *Bres.*

r. delica; *R. delica* *Fr.*

Por konservi la originalan epiteton "ĥloroida", mi konsideris du motivojn. Unue, ĝi estas internacie komprenebla por multegaj etime ĝemelaj vortoj (ĥlo-

rofilo, ĥloroformo k.t.p.). Due, esperantigi per traduko, ekz. verdeta, palverda, flavverda k.s. kaŭzus nerezoneblecon, eĉ konfuzeblecon kun aliaj specioj, ekz. *R. virescens*, *R. aeruginea*. Menciindas, ke la ĉefa scienca nomo estas "ĥolubinka akvamarínová", t.e. "rusulo akvamarina". Pri neceso konservi la originalan helenan prononcon kun ĥ mi skribis jam plurfoje (ekz. 1980, 1981).

Koncerne la epiteton "delica" ne aperas problemoj, ĉar la radiko estas registrita en PIV. Sole la prononco estas malsama kompare kun la latina originalo, kiu sonas "delika".

3.1.2. subsekcio: nigriĝantaj; *Nigricantinae*

specioj: r. akrafolia; *R. acrifolia* *Romagn.*

r. adusta; *R. adusta* *Pers. ex Fr.*

r. densafolia; *R. densifolia* (*Secr.*) *Gill.*

r. nigriĝanta; *R. nigricans* *Fr.*

Inter la 4 listigitaj specioj estas nomenklature problemeca nur r. adusta. Ĉar en la Esperanto-leksiko mankas praktika vorto kun la signifo "brunigita (bruniginta) de fajro (rosto, bako, frito) aŭ de suno", mi proponas enkonduki la vorton "adusta". Ĝi estos bone aplikebla mult-okaze, do ne sole en la sfero botanika. Tiam, konforme al la latina semantemo, "adusti" signifus "esti adusta"; la ceteraj derivaĵoj estus "adustiĝi", "adustigi" k.t.p.

3.2. sekcio: heterofilaj; *Heterophyllae*

Da vortoj komenciĝantaj per la pseudoprefikso hetero- estas abunde (heterogena, heterospora, heterotrofa k.t.p.). Samo validas pri la vortoj, en kiuj "filo" signifas la helenan *φύλλον* (filogenezo, filokaktuso, briofilo, cianofilo k.t.p.). Nenio do malhelpas akcepti la botanikan epiteton "heterofila" por la senco "malsamfolia" (ĉi-okaze "malsamlamela").

3.2.1. subsekcio: amindaj; *Amoeninae*

specioj: r. aminda; *R. amoena* *Quél.*

r. amindakolora; *R. amoenicolor* *Romagn.*

r. violpieda; *R. violeipes* *Quél.*

3.2.2. subsekcio: verdetaj; *Virescentinae*

specio: r. verdeta; *R. virescens* (*Schaeff. ex Zanted.*) *Fr.*

3.2.3. subsekcio: sendoloraj; *Indolentinae*

“Sendoloraj” signifas, ke ili ne havas bruldoloran, sed dolĉan guston.
 specioj: r. kut(ikl)ofisura; *R. cutedructa Cooke ss. Romagn.*
 r. cianoksanta; *R. cynoxantha (Scheff.) ex Fr.*

Tre volonte mi konfesas, ke mia esperantigo per “kut(ikl)ofisura” estas mal-lerta. Espereble oni sukcesos trovi pli taŭgan solvon, kiu esprimus, ke la “ĉa-pelŝelo”, fake dirite “pileokut(ikl)o”, estas fisurhava.

Pri “cianoksanta”, t.e. “blue ora” validas la jam supre menciita leksika prin-cipo: ekzistas multaj precedentoj kun “-cian²” kaj “-ksant²”.

3.2.4. subsekcio: rigidaj; *Rigidae*
 specioj: r. mustela; *R. mustelina Fr.*
 r. veska; *R. vesca Fr.*

Sincere dirite, mi cerbumis iom longe pri la signifo de *vesca*, kies etimoj estas *ve* = malbone kaj *esca* = manĝaĵo. Origine do: malbone manĝanta, magra, sed ankaŭ magriga, ekz. *vescum papaver* = papavo sekiganta la grun-don... Spite al ĉio ĉi, en botanikaj vortaroj oni trovas la tradukon: manĝebla, bongusta k.s. Bongustega ja estas tiu specio, sed ankaŭ relative seka kaj sur relative sekaj grundoj kreskanta. Sekve restas la problemo, kiel traduki plej taŭge. Post hezito mi proponas la neologismon “vesko” kun la signifo unika por la specio. “Vesko” estu la substantivigita formo por la specia nomo: ru-sulo veska. La substantivigitan specian epiteton oni ofte uzas ja en la parol-lingvo: eks. “ermeno” estas “mustelo ermena”.

3.2.5. subsekcio: grizaj; *Griseinae*
 specioj: r. verdigra; *R. aeruginea Lindbl. in Fr.*
 r. anasa; *R. anatina Romagn.*
 r. griza; *R. grisea (Pers. ex) Fr.*
 r. pallazura; *R. parazurea J. Schaeff.*

Kion fari, se *Kalocsay* nomis la karbonatiĝintan kuprosurfacon “verdigro”? Ja la pli internacia “aerugo” ĉi-okaze konvenus al ni pli bone.

Kiom temas pri “r. pallazura”, mi timas, ke la legantoj — ĝis nun eble pa-ciencaj — eligos protestan krion pro mia mistraduka akrobataĵo. Ne sen ma-liceto mi povus rebati, ke ili inventu pli taŭgan epiteton por tiu ĉi rusulo, kies pilea kuto havas koloron de “peza pluvorporta nubego”. Ankoraŭ al la ter-mino “kuto” (latine, angle kaj hispane *cutis*): ĝi ŝajnas al mi pli taŭga ol la “kutiklo” registrita en PIV.

3.3. sekcio: sengraciaj; *Ingratae*
 “*Ingratae*” signifas: malagrablaj, malbonvenaj, malŝatataj. Do mia laŭsone pli fidela esperantigo estas iom eŭfemisma...

3.3.1. subsekcio: fetoraj; *Foetentinae*
 specioj: r. farunpieda; *R. farinipes Romell in Britz.*
 r. fetora; *R. foetens Pers. ex Fr.*
 r. laŭroceraza; *R. laurocerasi Melz.*
 r. subfetora; *R. subfoetens Smith*
 r. amindolea; *R. amoenolens Romagn.*
 r. livedeska; *R. livescens (Batsch) ex Quél. ss. Bres.*
 r. pektena; *R. pectinata (Bull. ex St.-Amans) Fr.*
 r. pektenoida; *R. pectinatoides Peck ss. Sing.*
 r. soroida; *R. sororia (Fr.) Romell*

El la 9 listigitaj specioj iom malfacilas jenaj:

Livescens signifas “iom plumbkolora”. Inter la speciaj epitetoj en botani-ko (kaj ankaŭ speciale en mikologio) ekzistas ankaŭ *lividus* = plumbkolora (angle *livid*, france *livide*, hispane *lívido*). Mi ne bezonas enkonduki novan radikon, ĉar la medicinistoj jam faris tion: livedo (por violeta haŭtaspekto kaŭzata de malvarmo). Tiel mia propono “livedeska” sufiĉe precize esprimas la deziratan kolornuancon kaj samtempe similegas al la latina originalo.

Pectinata signifas “kombileca”; ĉar en PIV oni registras la lambranflu-lan genron pekteno, kies konko estas kombileca, mi ne hezitas esperantigi la epiteton per “pektena”.

Plej problemeca estas la latina epiteto *sororia* = amasiĝinta. Tamen eblas profiti la jam registritan PIV-terminon “soro” = malgranda, densa amaso aŭ fasko de fungosporoj. Se mi aplikas la modifitan epiteton “soroida”, mi difektas la latinan originalon ne tre kaj samtempe konservas la signifon de iaspeca amasiĝo.

3.3.2. subsekcio: feleaj; *Felleinae*
 specioj: r. felea; *R. fellea Fr.*
 r. okreska; *R. ochroleuca (Pers.) ex Fr.*

3.4. sekcio: pipraj; *Piperinae*

- 3.4.1. subsekcio: lepidaj; *Lepidinae*
specio: r. lepida; *R. lepida Fr.*

En botaniko, *lepida* havas du signifojn:

1. gracia, ĉarma, belaspekta
2. skvameca, skvamohava (el la helena *λεπίς* = skvamo, kp. la plantogenron *Lepidium*). Ĉi-senca vortero lepid- aperas ankaŭ en la terminoj de mineralogio kaj petrologio.

Nin interesas tamen la senco 1., kies esperantlingvaj ekvivalentoj bedaŭre ne taŭgas al vortsimila traduko. Ŝajnas do, ke ne eblas eviti enkondukon de la neologismo “lepida” = belaspekta.

- 3.4.2. subsekcio: ruĝaj; *Rubrinae*
specio: r. ruĝa; *R. rubra (Lam. ex Fr.) ss. Krombh., Bres.*

Ekzistas ja la vorto “rubriko”, sed tamen mi ne aŭdacas proponi la neologismon “rubra”, kiu estus pure sinonima al “ruĝa”.

- 3.4.3. subsekcio: emetika; *Emeticinae*
specioj: r. emetika; *R. emetica Fr.*
r. nobla; *R. noblis Velen.*

Ĉar la vorto “emetiko” estas jam registrita en PIV por vomiga drogo, mi ne vidas obstaklon por la koncerna epiteto “emetika”.

- 3.4.4. subsekcio: citronaj; *Citrinae*
specio; r. suna; *R. solaris Ferd. et Winge*

- 3.4.5. subsekcio: ondumataj; *Undulateae*
specioj: r. atrorubenta; *R. atrorubens Quél. (ss. J. E. Lange)*
r. fragila; *R. fragilis Pers. ex Fr.*
r. ondumata; *R. undulata Velen.*

Atrorubens signifas; malhele ruĝeta. Eble iu tradukus “atroruĝeta”, sed mi ne aŭdacas iniciati aplikadon de la prefikso atro-, kvankam ĝi estus pli eleganta ol malhel-. Jam nun svarmas en Esperanto afiksemuloj (kp. Kavka 1986), kies proponoj aŭ naskiĝis mortaj aŭ ie-tie fantomas, impresante ekstravagance.

- 3.4.6. subsekcio: violaj; *Violaceinae*
specio: r. viola; *R. violacea Quél.*

- 3.4.7. subsekcio: elpaliĝantaj; *Exalbicaninae*

La subsekcio-nomo estas dubinda ne sole en Esperanto, sed ankaŭ en la latina. *Romagnesi* derivis ĝin de la nomo specia: *R. exalbicans Pers. ex Secr. ss. Melz. et Zv.* (t.e. r. blankiĝanta), sed la koncerna specio nuntempe nomiĝas *R. pulchella Borsz.* (t.e. r. belega).

specio: r. pulĥela; *R. pulchella Borsz.*

Mi rezignas pri la traduko laŭsenca, ĉar ĝi tro malsimilus al la originalo.

- 3.4.8. subsekcio: sardonaj; *Sardoninae*
specioj: r. badia; *R. badia Quél.*
r. keleta; *R. queletii Fr.*
r. ruĝpieda; *R. rhodopoda Zv. in Melz. et Zv.*
r. sangvina; *R. sanguinea (Bull. ex St.-Amans)*
r. sardona; *R. sardonina Fr.*

La epiteto “badia” = kaŝtanbruna (angle *badious*, france *bai*) viciĝas al la epitetoj “veska”, “lepida” k.t.p., kiuj en la esperantlingva nomenklaturado apenaŭ devus esti tradukataj laŭsenca.

R. sanguinea povus esperantiĝi tutsimple kiel “sanga”. Tamen mi timas, ke ĝi elvokus imagon pri sangado. Ja ekzistas fungoj, ekz. fistulino hepatica, kiuj kvazaŭ sangas. Jen kial mi preferas la epiteton “sangvina”, kiu estas registrita en PIV eĉ dufoje: 1. riĉtemperamenta, 2. desegnita per okre ruĝa kraĵono.

- 3.5. sekcio: inkrustitaj; *Incrustatae*

- 3.5.1. subsekcio: rozaj; *Roseinae*
specioj: r. aŭrora; *R. aurora Krombh.*
r. miniaturo; *R. minutula Velen.*
r. pseŭdointegra; *R. pseudointegra Arn. et Gor.*

- 3.5.2. subsekcio: lilaj; *Lilacinae*

Eblus uzi ankaŭ “lilakaj” por ankoraŭ pli proksimigi la specian epiteton al la latina originalo. “Lilako” estas en PIV registrita kiel specio de siringo.

specio: r. lil(ak)a; *R. lilacea Quél.*

- 3.5.3. subsekcio: ametistaj; *Amethystinae*
specioj: r. lazura; *R. azurea Bres.*
r. ametista; *R. amethystina Quél.*
r. rozpieda; *R. roseipes Secr. ss. Bres.*
r. turka; *R. turci Bres.*

Por eviti miskomprenon, mi atentigas, ke r. turka ne estas nomita laŭ Turkio, sed honore al la baronino *Turco-Lazzari*, aŭtorino de multnombraj bild-tabuloj en *Iconographia mycologica* (Bresadola 1881).

- 3.5.4. subsekcio: ĥameleonaj; *Chamaeleontinae*
specioj: r. ĥameleona; *R. chamaeleontina* (Fr.) ex Fr.
r. vitela; *R. vitellina* (Pers.) ex S. F. Gray

- 3.6. sekcio: teneraj; *Tenellae*

- 3.6.1. subsekcio: puelaraj; *Puellarinae*
specioj: r. puelara; *R. puellaris* Fr.
r. varikolora; *R. versicolor* J. Schaeff.

Puellaris signifas: knabin(ec)a. Mi rezignas pri ties laŭsenca traduko.

“Varikolora” (angle *vari-coloured*, france *versicolore*) povus anstataŭiĝi per “diverskolora”, kio tamen — en la laŭlfabeta indekso — registriĝus sub alia litero ol la latina originalo.

- 3.6.2. subsekcio: rozeolaj; *Rhodellinae*

La subsekcio-nomo devenas de la latinigita greka adjektivo *ρόδεος* = roz(ko)lor)a. La latina sufiksto *-ell-* estas diminutiva, do devus esti “rozetaj”. Tamen — post iom da cerbumo — mi elektis “rozeolaj” laŭ la PIV-radiko, kiu signifas erupcion de etaj rozaj rondaj makuloj, aperantaj ekz. post fortaj emocioj.

- specio: r. melcera; *R. melzeri* Zv.

La specio estas nomita laŭ la eminenta ĉeĥa mikologo, specialisto pri la rusuloj. Lian germandevenan nomon ankaŭ ĉeflingve oni prononcas kun C.

- 3.6.3. subsekcio: sfagnofilaj; *Sphagnophilae*

Ĉi-okaze, “-filaj” ne devenas el *φύλλον* = folio, sed el *φιλέω* = mi amas. Kp. ĥalkofila (= kupron ŝatanta), hidrofila, filantropo, filozofo k.t.p.

- specio: r. nitida; *R. nitida* Fr. ss. J. Schaeff.

Nitida (angle nitid) signifas: bril(ant)a, kio laŭsone malsimilegas al la latina originalo.

- 3.6.4. subsekcio: larikaj; *Laricinae*
specioj: r. cedanta; *R. cessans* Pears,
r. naŭza; *R. nauseosa* Fr. ss. Cooke

- 3.7. sekcio: polifromaj; *Polychromae*

- 3.7.1. subsekcio: mielodoraj; *Melliolentinae*
specioj: r. mielodora; *R. melliolens* Quél
r. viskeca; *R. viscida* Kudrna

Viscida signifas: glueca. Traduki per “viskoza” ne estus trafe, do mi opinias, ke “viskeca”, t.e. “glueca kiel visko” konvenas pli.

- 3.7.2. subsekcio: verdiĝantaj; *Viridantinae*

Tiun ĉi subsekcion oni facile identigas helpe de la fersulfata akvosolvaĵo (10%): la rusulkarno reagis per verda koloriĝo. La reakcion malkovris la ĉeĥaj mikologoj V. Melzer kaj J. Zvára.

- specio: r. kserampelina; *R. xerampelina* (sensu lato)
(Schaeff.) ex Fr.

Xerampelina devenas de la helenaj vortoj *ξηρός* = seka, *ἀμπέλινος* = vita. La laŭsenca traduko nomenklature ne konvenas.

- 3.7.3. subsekcio: vinozaj; *Vinosae*

Laŭsence pli proksima subsekcio-nomo estu “vinecaj”, sed ankaŭ la laŭsone pli proksima “vinozaj” eblas.

- specioj: r. amara; *R. amara* Kuĉera
r. klaraflava; *R. claraflava* Grove
r. vinoza; *R. vinosa* Lindbl.

- 3.7.4. subsekcio: olivecaj; *Olivaceinae*
specioj: r. allutea; *R. alutacea* (Pers. ex Fr.) Fr.
r. oliveca; *R. olivacea* (Schaeff.) ex Fr.

- 3.7.5. subsekcio: integraj; *Integrinae*
specio: r. polifroma; *R. polychroma* Sing.

- 3.8. sekcio: kokcinelaj; *Coccineae*

Coccineae signifas “skarlataj”, sed eblas uzi “kokcinelaj” laŭ la skarlatkolora skarabeto.

- 3.8.1. subsekcio: dekoloriĝantaj; *Decolorantinae*
specio: r. dekoloriĝanta; *R. decolorans*(Fr.) Fr.

- 3.8.2. subsekcio: paludozaj; *Paludosinae*
specioj: r. velenovska; *R. velenovskyi* Melz. et Zv.

Paludosa signifas: marĉa, en marĉoj kreskanta. Ĉar en PIV estas jam registrita “paludismo” kaj ĉar “-ism-” estas oficialigita sufikso, oni povas akcepti la sinonimon de marĉo: paludo. Cetere ekzistas ĝemelradikaj terminoj: paludario, paludino k.a.

3.8.3. subsekcio: lardaj; *Laetinae*

La latina adjektivo *laetus(a, um,)* signifas origine: grasa, bone nutrita; metafore: gaja. La origina senco verŝajne koheras kun *laridum* = graso, lardo.

specioj: r. orata; *R. aurata* (*With. ex Fr.*) *Fr.*

3.9. subsekcio: insidozaj; *Insidiosae*

3.9.1 subsekcio: urtikecaj; *Urentinae*

Urens signifas: brula (ĉi-okaze ne brultuŝa, sed brulgusta). La plantnomo “urtiko” ja povas bone servi por la subsekcio-nomo de la rusuloj.

specioj: r. kupra; *R. cuprea* *Krombh.*

r. firma; *R. firmula* *J. Schaeff.*

r. gigasperma; *R. gigasperma* *Romagn.*

Ne estas necese traduki per “gigantsperma”, ĉar la helendevena “giga-” estas bone komprenebla. Temas ja pri grandaj sporoj.

3.9.2. subsekcio: makulataj; *Maculantinae*

r. decipienta; *R. decipiens* *Sing.*

specioj: r. lundela; *R. lundellii* *Sing.*

r. makulata; *R. maculata* *Quél.*

r. vinozapurpura; *R. vinosopurpurea* *J. Schaeff.*

Decipiens signifas: tromp(em)a. Nome, r. decipienta apartenas al la malfacile identigeblaj specioj. Distingebleco de r. vinozapurpura apogas sin sur mikroskopio kaj mikrohemio: la piedkuto de r. decipienta koloriĝas ruĝe sub efiko de ĥlorovanilino.

4. Elektita literaturo

Ainsworth, G. C. - Bisby, G. R. (1971): *A Dictionary of the Fungi*. (6 Ed.) — Kew Surrey.
Berger, K. k.a. (1980): *Mykologisches Wörterbuch* (3200 Begriffe in 8 Sprachen). 432 S. — Fischer, Jena.

Bresadola, A. J. (1927-1933): *Iconographia Mycologica*. Vol. 1-26. — Milano.

Fidalgo, O. — Fidalgo, M. E. P. K. (1967): *Dicionario micológico*. — São Paulo.

Kaegi, A. (1904): *Benselers griechisch-deutsches Schulwörterbuch* (12. Aufl.). 982 S. — Teubner, Leipzig u. Berlin.

Kavka, J. (1980): La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. — Kolekto de la seminariaj referaĵoj: AEST (Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko), 93-100. *Ústí nad Labem*.

Kavka, J. (1981): Onomastiko e — akterminoj konsidere ilian esperantiĝon. — Kolekto de la referaĵoj de konferenco: AEST (Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko, vol. 1, p.6-14. *Žilina*.

Kavka, J. — Mlynár, F. (1982): Botanika vortaro de *F. Mlynář*, - *Sciencia Revuo*, 33,3, 69-86. Pizo.

Kavka, J. (1986): Pri nove proponataj afiksoj el la vidpunkto taktika. - *Sciencia Revuo*, 37, 2, 43-49. Pizo.

Lange, J. (1935-1940): *Flora agaricina danica*. 1-5. — *Copenhagen*.

Melzer, V. (1944): *Holubinky*. 54 str. — *Kvasnička a Hampl, Praha*.

Melzer, V. (1945): *Atlas holubinek*. 216 str. — *Kropáč a Kucharský, Praha*.

Melzer, V. - Zvára, J. (1927): *České holubinky (Russulae Bohemiae)*. — *Arch. přírodověd. Výzk. Čech*, 17/4 (109). *Praha*.

PIV: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). — Ĉefred. G. Waringhien. Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris*.

Pražák, J. - Novotný, F. — Sedláček, J. (1937): *Latinsko-česky' slovník k potřebě gymnasií a reálných gymnasií*. 1348 str. — *Čsl. graf. unie a.s.*

Romagnesi, H. (1967): *Les russules d'Europe et d'Afrique du Nord*. 1.000 p. — *Bordas, Paris*.

Schaeffer, J. (1952): *Russula- Monographie*. (2. Aufl.) - En: *Die Pilze Mitteleuropas*. *Simondetti, M.* (1961): Kiamaniere distingi la fungojn? 39 p. — *Varese*.

Snell, W. H. - Dick, E. A. (1971): *A glossary of mycology*. 2 Ed. — *Harvard Univ. Press, Cambridge, Mass.*

Svrček, M. - Erhart, J. — Erhartová, M. (1984): *Holubinky*. 168 str. — *Academia, Praha*.

Velenovský, J. (1920-1922): *České houby*. 1-5. — *Čes. botan. spol., Praha*.

Veselý, R. - Kotlaba, F. — Pouzar, Z. (1972): *Přehled československých hub*. 424 str. — *Academia, Praha*.

Esperantské názvosloví holubinek

Předložené názvosloví vychází z mezinárodní nomenklatury a snaží se co nejvěrněji zachovat jak podobu, tak i významový obsah latinského originálu, aby nebyla porušena kontinuita mezi dosavadní mykologickou literaturou a pracemi psanými v esperantu. Opírá se přitom o různojazyčné monografie a slovníková díla. Co se týče rozdělení na sekce a podseky rodu holubinka, drží se soustavy, kterou navrhl Romagnesi (1967).